

Heinrich Heine, En dolĉega Maj,' <i>tradukita de Friedrich Pillath</i>	Heinrich Heine, En Majo <i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	Heinrich Heine, Im Mai	Heinrich Heine, En admirinde bela maj' <i>tradukita de Hans-Georg Kaiser</i>
Printempe en dolĉega Maj', Dum la burĝonoj kre- vis, El mia koro ĝerme Amsento sin eklevis.	En Majo, kiam ĉiuj Burĝonoj malfer- miĝis, La amo kiel floro En mia kor' estiĝis.	Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Knospen spran- gen, Da ist in meinem Herzen Die Liebe aufgegangen.	En admirinde bela maj', dum jam burĝonoj krevis, jen ankaŭ miakore la amo sin eklevis.
Printempe en dolĉega Maj', Dum birda kanto sonis, De l' kora mi sopiro Konfeson al ŝi donis.	En Majo, kiam ĉiuj Birdetoj sin aŭdigis, Al ŝi deziron mian Sopiran mi sciigis.	Im wunderschönen Monat Mai, Als alle Vöglein sangen, Da hab' ich ihr gestanden Mein Sehnen und Verlan- gen.	En admirinde bela maj', dum birdotril' senbri- dis, jen mi al ŝi sopirojn, dezirojn, ekkonfidis.
<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).</i>  <i>Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)</i>  <i>Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon <a href="http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath">http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath</a>.</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1982-11-14.</i>  <i>MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)</i>  <i>La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.</i>	<i>Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).</i>  <i>Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)</i>  <i>Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.</i>	<i>Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).</i>  <i>Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)</i>  <i>La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.</i>